Rinuncie: Eventuali rinunciatari al viaggio avranno diritto al rimborso delle somme versate meno il 10% della quota di partecipazione, purché la rinuncia avvenga almeno 20 giorni prima della partenza. Dopo tale termine, verranno anche addebitate le spese di annullamento dei servizi. Nessun rimborso è dovuto a chi rinuncerà il giorno della partenza o durante il viaggio.

Responsabla: Nessuna responsabla assume la FEI per eventuali danni a persone o cose di loro proprietà durante il viaggio, come pure per eventuali maggiori spese causate da ritardi, interruzioni, variazioni nei corsi delle valute (rispetto alle quotazioni in vigore nel gennaio 1968), ecc., i cui oneri saranno a carico dei partecipanti. Il bagaglio viaggia ad esclusivo rischio dei partecipanti e pertanto la FEI consiglia di provvedere all'eventuale assicurazione del bagaglio stesso.


Variations: Per cause di forza maggiore, il viaggio potrà essere modificato o sospeso con il solo obbligo, da parte della FEI, di restituire le somme incassate. Se la mancata effettuazione fosse dovuta a cause superiori, quali motivi politici, disordini, sospensioni dei permessi da parte delle autorità competenti, ecc., potrà essere trattenuto fino ad un massimo del 5% della quota viaggio a titolo di concorso nelle spese di organizzazione.

Passaporti: Ogni partecipante al viaggio dovrà essere in possesso di passaporto individuale valido per le nazioni attraversate. Non sono richiesti visti consolari.

Autorizzazione, per l'organizzazione del viaggio richiesta al Ministero del Turismo.

I Soci iscritti alla FEI, almeno dal 1967, ed in regola con il pagamento della quota per il 1968, potranno partecipare gratuitamente alle gite a Toledo e Montserrat, a condizione che inviino la prenotazione per l'intero viaggio entro il 1° aprile 1968.

SUKCESA JUNULARA MANIFESTACIO EN PALERMO



La 17-an de decembro, je la 10,30 h., en la salonego de Klubo «Kulturo kaj Progreso», la esperantistaj gejunuloj memorigis L. L. Zamenhof, okaze de la datreveno de lia naskiĝo. Antaŭ multenombra publiko, malfermis la manifestacion studento Mannina Giuseppe, kiu invitis la lerneajn aŭtoritatojn plibonigi la tradician instruadon per programoj pli konformaj al la postuloj de nuntempa kulturo. «Sperto — li diris — jam instruis nin, ke la kono de tradiciaj lingvoj estas atingibla de malmultaj lernantoj kaj precipe de kiuj posedas tempon kaj monon por daŭrigi la lernadon. Mi konstatis, ke Esperanton, kontraŭe, oni parolas kaj legas frue kaj facile».

Poste, prof-ro Picciotto Giuseppina disdonis 33 unuagradajn atestojn kaj invitis la gejunulojn daŭrigi la studadon de la Internacia Lingvo por akiri triagradan diplomon. D-ro Picciotto F. Paolo, kiu multe klopodis por la junulara agado en Palermo, prelegis pri la vivo de Zamenhof kaj la historio de Esperanto-movado en la tuta mondo. «Dubo pri la sukceso de nia movado — li diris — signifas dubo pri la sopiro de la Homo al sia perfektigo; signifas nei la devon de la Homo realigi la valorojn, kiujn la vivo postulas por ke li digne povu vivi ĝin». Paroladis poste Prof-ro Mezzatesta Girolamo, estro de mezlernejo en Campofelice di Roccella kaj Direktoro de la Palerma Popol-Universitato, kaj Prof-ro Alonzo Giovanni, instruisto ĉe la loka Turisma Lernejo.

Fermis la manifestacion Hon. Di Piazza Natale, nacia deputito de P.S.U., kiu promesis sian apogon por ke leĝpropono 1816 estu aprobita de nia Parlamento. Posttagmeze, ĉ. 300 personoj partoprenis dancfeston kaj lotadon dum kiuj estas elektita «Fraŭlino Amikeco» Campisi Silvana. Krome, la gejunuloj aranĝis ĉe la Klubo ekspozicion de Esperanto-libroj; aliĝis novaj membroj kaj oni disvendis gramatikojn.

Pri la manifestacio favore raportis taggazeto «L'ORA».

NOVA SENTO

Rubriko por la gejunuloj

Redaktoro: S-ro Silvio STOPPOLONI - Via Guerrazzi 24 - PISTOIA

JUNA AMIKINO FORLASIS NIN

Vi jam scias, karaj geamikoj ke ni perdis por ĉiam junan esperantistinon, junan forton, kiu ĝis hieraŭ estis inter ni kaj laboris serioze kun ni: Maria Luisa Fiore ne plu estas, sed ne malaperos ŝia laboremo kiun precipe ni gejunuloj devas memori. Ŝi estis estrarano de IEJ kaj jam komencis agadi vere kompetente, kiam nepardonema malsano forprenis ŝin.

Kio pli dirinda? Vortoj en tiuj kortuŝaj okazoj estas senutila retoriko. Kiam unu el ni kun kiu, antaŭ malmulta tempo, ni estis laborantaj, parolantaj kaj amuzantaj, ne plu estas, nur ĉagreno kaj vakuo restas en niaj koroj.

La plej bona maniero por rememori Maria Luisa estas agi kiel ŝi agis, labori kiel ŝi laboris kaj la gejunuloj, kiuj konis ŝin certe akceptos tiun alvokon.

Sekvi la ekzemplon de tiuj, kiuj lasis heredaĵon de sentoj, laborplanoj, ideoj estas efek-



tive la plej taŭga maniero por ke la laboro de la estintoj ne estu vana; kaj agi kun laboremo kaj sindediĉo estas sendube kio, pli ol alio, kontentigus ilin.

S. S.

MEMORE DE MARIA LUISA FIORE


Flor' el floroj, revofonto,
vivo vigla, esperplena,
brile lumis laŭ kor-ondo,
dum maturis jun' serena.
Al lernantoj sciavidaĵ
Esperanton ŝi konigis,
idealoj plej validaj
vokis ŝin kaj streĉe ligis.

Tristis hor', kruelis sorto
kontraŭ ravaj puraj ĉarmoj
per terura malsanporto,
kun amaraj brulaj larmoj.
Vanis, ve, la venksopiro
de l' verdaĝa fortosento:
prema spir' pro karnoŝiro,
tig' falĉata de l' turmento.

La katenon de l' doloroj
rompis tag' aŭtuna griza:
dolĉe velkis Flor' el floroj!
Pace dormas nun Mariza!

Luigi Minnaja

INVITO A MONTECATINI



Fervono i preparativi per il IV Incontro della Gioventù Esperantista Europea e per il 39° Congresso Italiano di Esperanto che richiameranno a Passignano parecchie centinaia di esperantisti nella celebre cittadina toscana. Ricordiamo in particolare ai giovani che il termine utile per la partecipazione al Concorso Letterario abbinato alle due manifestazioni scade il **28 febbraio 1968**. Per le iscrizioni e per ogni altra informazione rivolgersi a «Congresso di Esperanto - Ente Provinciale per il Turismo - Corso Gramsci, 48 - 51100 PISTOIA».

RASSEGNA DELLA STAMPA a cura di FRANCESCO BORZANI

(continuazione dal numero precedente)

Nell'articolo « Esperanto lingua dell'avvenire » il prof. Dino Fabris sulla rivista « **Orientamenti per la famiglia** » di Padova di ottobre, esamina con la perizia dello scienziato le origini della lingua e del pensiero zamenhofiani, quindi il faticoso ma brillante cammino di questa Lingua e dei suoi successi dal suo riconoscimento da parte dell'Assemblea UNESCO di Montevideo 1954 fino alla diffusione dell'impiego dell'E. nel turismo, negli affari, nella pubblicità offerta dalle grandi aziende come Philips, Fiat; Gevaert, ecc.; Fabris giunge a sottolineare che dell'E. si interessarono forse in proporzione più persone qualificate che non la massa del popolo che, in definitiva ne dovrebbe godere i maggiori vantaggi se è vero che questa lingua fu chiamata « latino della democrazia » da Papa Pacelli. Fabris conclude la sua dotta dissertazione chiarendo l'origine e la portata della proposta di legge attualmente giacente in Parlamento per l'introduzione dello studio dell'E. nella scuola italiana e gli ottimi frutti che verrebbero raccolti ove tale proposta venisse accolta.

Andrea Dionisi, dal canto suo, su « **Arena** » di Verona del 10 ottobre '67, prendendo lo spunto dall'anniversario della scomparsa di Zamenhof, fa un esame attento dei vari tentativi di creazione di lingue internazionali per giungere alla conclusione « ...è indubitabile che oggi il problema di una lingua universale si è riproposto in tutta la sua ampiezza, come già avvenne sulla fine dell'Ottocento. Ora però l'urgenza e la necessità sono di gran lunga superiori, date le dimensioni e le prospettive del mondo contemporaneo... D'altro canto, continua Dionisi « sussiste il rischio che, in fatto di lingue nazionali la confusione torni a crescere, come conseguenza diretta dell'indipendenza ottenuta da tanti popoli, i quali tendono ad imporre la loro lingua per ragioni di prestigio; perciò gli studiosi di lingua sono chiamati a recare un grande servizio, contribuendo ad agevolare la spinta del mondo contemporaneo verso le grandi comunioni umane... ».

Anche la grande stampa ha dimostrato uno spiccato interesse per il problema della lingua internazionale e le sue soluzioni giacché Ugo Spirito sul « **Corriere della Sera** » di Milano del 14 luglio '67 ha trattato il problema del bilinguismo. Nel suo articolo intitolato « Dall'asilo all'Università, obbligatorio l'inglese », Spirito afferma che « il problema della unificazione delle lingue ha già trovato una serie di soluzioni adatte, sia pure parzialmente, a risolverlo. Ma è evidente che le varie soluzioni non possono soddisfare tutte le esigenze dell'effettiva adeguata comunicazione e che il bisogno di una sola lingua parlata da tutti i popoli si faccia sentire con forza sempre maggiore. Né sono mancati i tentativi di escogitare una siffatta lingua già esistente o addirittura morta come il latino, sia costruendo una lingua nuova risultante in qualche modo da quelle esistenti; l'esempio dell'esperanto è fra i più significativi ».

A tale problema ed in particolare per suggerire l'E. come strumento efficace per la soluzione più adeguata si sono interessati vari lettori che hanno scritto lettere al « **Corriere** » pubblicate il 18 agosto ed il 15 settembre; due lettere portano le firme di Carla Panaro Tichatschek di Cortina d'Ampezzo e di Anna Fumagalli di Milano.

Anche « **La Stampa** » di Torino, in un editoriale dal titolo « Difesa della Lingua » pubblicato nel numero dell'11 luglio scorso, nel segnalare il rifiorire dell'E. con la magnifica traduzione del « Sommo poema » di Peterlongo osserva che questa lingua universale ha fatto e fa notevoli progressi; l'autore di questo articolo che si firma l.p. conclude dicendo che « quel che separa l'E. dal trionfo è fra l'altro la concorrenza di quel gergone franco-anglo americano che ormai si innesta a tutti gli idiomi e tutti guastandoli presume di diventare, esso stesso, lingua universale ».

Citare qui tutti gli articoli apparsi in questi mesi sulla stampa italiana sui problemi connessi con il problema della lingua internazionale sarebbe impossibile, dato l'enorme numero di ritagli pervenuti e la mancanza di spazio che ci affligge. Dalle Alpi alla Sicilia è tutto un fervore di interessamento; ciò ci conforta ed è un indice dell'importanza che il pubblico annette ad una questione che noi cerchiamo di portare avanti con le nostre forze.

Ritourneremo presto sull'argomento e non mancheremo di informare adeguatamente i nostri lettori delle opinioni espresse dal pubblico attraverso la stampa maggiore e minore.

Avete già rinnovato l'adesione alla F.E.I. per il 1968? Dopo il presente numero verrà sospeso l'invio della rivista a coloro che nel frattempo non avranno regolarizzato la loro posizione.

VIVO DE LA GRUPOJ

BOLOGNA

La 5-an de novembro okazis esperanto-manifestacio, kiu havis grandan sukceson pro la ĉesto de grupo de junaj Parizaj fervojistoj esperantistaj kaj pro la multnombra ĉesto de diplomitoj kaj lernantoj de esperanto-kursoj. Post enkondukaj vortoj de D-ro Cuppini, S-ino Gamberini parolis pri la vivo de Zamenhof, pri la esperanto-organizaĵoj kaj la neceso aliĝi kaj partopreni al la vivo de nia movado. Poste S-ro Gimelli prezentis al la ĉeestantaro la grupon de la francaj ĝejnuloj fervojistaj. F-ino Liliana Poussard salutis la publikon kaj aparte dankis la bologniajn ĝeamikojn pro la tre agrabla restado, kiun la francoj havis dum kvin tagoj en Bologna. Poste okazis la disdono de la diplomoj al la gekursanoj de la kursoj unuagrada kaj duagrada.

Ĉe tablo de restoracio la partoprenantoj al la manifestacio, kune kun la francaj gastoj, kunvenis por komuna tagmanĝo. Posttagmeze la tradicia balo en la salono Edera fermis la Esperanto-tagon.

COMO

La lokaj gazetoj « La Provincia », « Corriere della Provincia », « Politica Socialista », « l'Ordine » kaj « ol Tivan » plurfoje pritraktis dum la lastaj monatoj esperanton kaj la agadon de la urba esperantista grupo.

Entute aperis 10 artikoloj kaj mencioj pri tiuj temoj.

GROSSETO

La 15-an de Novembro, en la paroĥa salono de S. G. B. Cottolengo, oni malfermis oficiale, per ĝenerala kunveno de grupanoj kaj simpatiantoj, la 7-an socian jaron de la Grupo.

La kunvenintoj pridiskutis vastan tagordon, kiu enhavis interalie la elekton de la estraro por la jaro 1967-68.

Ĝia konsisto rezultiĝis jena:

S-ro Ricci Ricciardo (Prezidanto), S-ro Càsoli Massimo (Sekretario), S-ro

Nannetti Garibaldo (Konsilanto), F-ino Feroci Luciana (Konsilanto), S-ro Della Giovampaola Diano (Konsilanto), S-ro Monaci Roberto (Konsilanto).

Pri la propagandaj rimedoj, oni akceptis la proponon de S-ano Orlandini P. Vittorio, kiu sugestis disvolvi enketon inter la studentoj de la superaj lernejoj de la urbo, laŭ la konataj ekzemploj de Asti kaj Torino.

S-anoj Orlandini P. V., Della Giovampaola D. kaj Monaci R. pretigos la koncernan demandaron kaj kontaktigos kun la lernejestroj por la realigo de la enketo.

Antaŭ ol fermi la kunsidon, la sekretario Càsoli Massimo, anoncis la proksiman starigon de unuagrada esperanto-kurso ĉe mezgrada lernejo « G. Pascali », kaj raportis pri la kontaktoj de la Grupo kun la lokaj parlamentanoj por apogi la leĝproponon 1816.

Jam de longe, oni sendis al la konataj deputitoj kaj senatanoj oportunan dokumentan materialon pri esperanto kaj ĝia disvastiĝo.

Dank' al simpatiantoj Storch G., oni ricevis leteron de Deputito Enea Piccinelli, kiu kontaktiĝis kun la raportanto Deputito Franceschini, kaj certigis sian tutan apogon por la aprobo de la leĝpropono.

Pere de S-ano Nannetti G., alia parlamentano, Deputito Tognoni Mauro, ĵus certigis al la Grupo, per letero, sian interesiĝon por la enkonduko de esperanto en la italaj lernejoj.

MILANO

Dum la vendredaj klub-kunvenoj, la 10-an de novembro S-ro Dall'Acqua verve pritraktis la « Problemon pri neologismoj »; la 17-an de novembro D-ro Turone prelegis pri « Enkonduko al Lingvo Esperanto » kaj la 24-an de novembro la prezidanto de la klubo, Kav. Bertolletti, prezentis filmon faritan okaze de la nacia kongreso en Catania. Por digne rememori la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la klubo, kunlabore kun CEKIT, aranĝis dutagan ek-

spozicion de esperanto-libroj ĉe la sidejo en Placo Sempione 1.

NAPOLI

La 15-an de decembro, okaze de la naskiĝa datreveno de D-ro L. L. Zamenhof, kreinto de Internacia Lingvo Esperanto, la membroj de la napola Esperanto-Grupo « Harmonio kaj Progreso » kunvenis en la Sidejo de Via dei Fiorentini, 61.

La datreveno estis memorigita esperantlingve, per kortuŝaj paroladoj, de Prof-ro Carlo Agostini, membro de la Generala Akademia Konsilantaro de Itala Instituto de Esperanto, kaj de Prof-ro Enrico Mingo, Prezidanto de la Grupo.

Viglan intereson vekis la ekspozicio de la esperanto-libro aranĝita laŭtradicie tiuokaze. La loka gazeto « Roma » raportis pri la manifestacio la sekvontan tagon.

PISTOIA

Okaze de la jara asembleo de la grupo, la pistojaj esperantistoj kunvenis por viziti la novan straton, kiu estas titolita al esperanto.

Pri la kunveno raportis tagjurnalo « La Nazione ».

PORRETTA TERME

Dimanĉon la 29-an de oktobro okazis, en la salono de « Dopolavoro Ferroroviario », la disdono de la diplomoj de la pasintjara kurso kaj la inaŭguro de la novaj kursoj 1-a kaj 2-a gradaj. Ĉeestis la Prezidanto de F.E.I. D-ro Stoppoloni, la instruistoj Prof-ro Landucci kaj Casagrande kaj multaj novaj esperantistoj. Multenombra estis la publiko inter kiu troviĝis ankaŭ deko de bolonjaj geesperantistoj. D-ro Stoppoloni salutis la diplomitojn kaj invitis ilin daŭrigi sur tiu vojo. Li gratulis ankaŭ la Prezidanton de Dopolavoro Ferroroviario, S-ro Buscaroli, kiu gastigis kaj gastigos la kursojn. Poste, al 16 gekursanoj, la Prezidanto de F.E.I. disdonis la diplomojn.

RIMINI

La 10-an de decembro kvardeko de gestudentoj de la pasintjaraj esperanto-kursoj ricevis la diplomon ĉe la Salono de Banco « Credito Romagnolo ».

La manifestacion, tre simpatian, partoprenis ankaŭ la parencoj de la gestudentoj kaj pluraj invititoj.

SANT'ARCAANGELO DI ROMAGNA

La 12-an de novembro okazis renkontiĝo en S. Arcangelo di Romagna dum la tradicia « festo de la kokoj ». Pli ol 30 ges.anoj el urboj Rimini, S. Arcangelo, Modena, Catania kaj Bologna agrable gustumis la specialajn rostitajn kokojn, dum komuna tagmanĝo gaja kaj verva. Bolonja samideano, Alberto Marciano, ricevis de la kokkomitato la diplomon de « sperta frandemulo ». Vizito al la urbaj vidindaĵoj konkludis tiun gajan renkontiĝon.

TORINO

En la kadro de la agado ĉe neesperantistaj medioj, oni aranĝis ekspozicion pri Esperanto ĉe « Centro Internazionale Genti e Culture », kunvenejo por gestudentoj Sud-Amerikaj, Afrikaj kaj Aziaj. En la sama Centro, la 20-an de decembro, Prof-ino Conterno, Geom. Grattapaglia kaj S-ro Aguilar debatis la temon « La lingva problemoj kaj la solvo prezentita de Esperanto », antaŭ multenombra kaj atenta aŭskultantaro.

TRIESTE

Pro la geografia situo de la urbo, la klubo estas oftege vizitata de orienteŭropaj samideanoj. Fidela amikino estas la bulgara S-ino Maria Popova el Sofio. Antaŭ nelonge ni havis la plezuron gastigi profesoron Simeon Hesapčiev, eminenta lingvosciencisto, kiu kaptis la atenton de la ĉeestantoj per vigla leciono, en kiu li pruvis la taŭgecon de sia instrumentado, ne tute persona metodo, sed adaptita al esperanto. Vizitis la klubon neatendite D-ro Carlo Minnaja.

La junularo projekciis filmetojn kaj aranĝis simplan aŭtunan feston. La

bonŝancaj samideanoj, kiuj dum la someraj ferioj vojaĝis, raportis pri siaj landaj kaj eksterlandaj spertoj. Entute sufiĉa kaj varia aktiveco.

VERONA

(« Nur por virinoj »)

Kiel iam profesoro Karlo Minnaja parolis nur por viroj ĉe Lyon's Klubo de Sambonifacio (Verona), tiel, lastatempe, nia plurfoje premiita poetino Adriana Riccadonna parolis pri esperanto nur al virina aŭskultantaro. Tio okazis ĉe plenplena salono de la komunuma biblioteko de Verona, dank'al la invitoj de « F.I.D.A.P.A. », kiu estas ekskluzive virina organizo.

La trafa temo estis, « utileco de lingvo internacia esperanto ».

Post la prelego, sinjorece prezentita kaj atente sekvita, nia estimata poetino ricevis multe da konvinkaj aplaŭdoj.

Pri tiu interesa manifestacio — vere altnivela — vaste raportis la Verona tagjurnalo « Arena ».

M.E.L.

Konstatinte la internacian gravecon akiritan de « Premio Paganini » pro la partopreno de divers-kontinentaj violonistoj, la sekretario de Muzika Esperanto-Ligo proponis al la organiza komitato de la Premio, akcepti esperanton inter la lingvoj uzataj por la korespondado kun alilandaj konkursantoj.

Estus tre oportune, ke eksterlandaj violonistoj esperantistaj, kiuj interesiĝas pri eventuala partopreno al tiu « Premio », kontaktu: « Comitato Premio Paganini - Salita S. Francesco 4 - GENOVA - Italio ».

KOMENCIGIS NOVAJ KURSOJ

Bologna - Unuagrada ĉe Scienca Liceo « E. Fermi » kaj Stata Mezlernejo « Guido Reni ».

Como - Unuagrada ĉe la sidejo de la Grupo (lecionoj dufoje semajne).

Napoli - Unuagrada (gvidataj de Prof. Roberto Improta kaj Prof-ro Mingo), kaj duagrada (gvidata de Prof-ro Mingo). Entute vizitadas la kursojn

kelkdeko de gelernantoj ĉe la sidejo de la Grupo « Harmonio kaj Progreso ».

Palermo - Unuagrada kaj duagrada aranĝitaj de la Palerma katedro.

Parma - Unuagrada ĉe la sidejo de la Grupo (gvidata ĉiuvendre de universitata profesoro Guglielmo Capacchi.

Trento - Unuagrada ĉe la sidejo de la Grupo (partoprenas deko de gelernantoj sub la gvidado de Prof-ro Pietro Dao).

Gustigo - Inter la lernejoj, kie okazis E-kursoj dum la pasinta lernojaro (vd. n.ron 116-117 de la revuo), oni preterlasis jenajn:

NAPOLI - Ĉe Stata Liceo « A. Genovesi »: 2 kursoj (unuagrada kaj duagrada); ĉe Mezlernejo « Umberto Saba »: 6 kursoj (4 unuagrada, 1 duagrada, 1 triagrada).

ĜOJE KAJ MALĜOJE EN LA ESPERANTISTAJ FAMILIOJ

Naskiĝo

Fabrizio, ĝoje eniris la esperantistan mondon la 24-an de decembro 1967 en la hejmo de geedzoj Berretta (Torino). Lia patrino estas sekretariino de I.E.F. kaj jam promesis aligi lin al la denaska esperantistaro de nia Federacio. Al la feliĉaj gepatroj, korajn gratulojn!

Geedziĝo

La 20-an de decembro geedziĝis F-ino Andreina Castellaro, membro de la napola E-Grupo « Harmonio kaj Progreso », kun D-ro Mario Celentano. La festa ceremonio okazis en la Preĝejo S. Giovanni dei Fiorentini.

Nia Federacio kore gratulas.

Forpasoj

La Trento-Grupo havis novan perdon. La 15-an de Decembro pro aŭtomobilakcidento, forpasis la 29-jaraĝa Cesarino Corrent, kiu esperantiĝis antaŭ du jaroj kaj estis fervora ano de nia movado. Al liaj familianoj ni sendas elkorajn kondolencojn.

Lastmomente atingis nin la funebra sciigo pri la morto de kom. Francesco Ramolfo (longjara membro de nia Federacio kaj de la Torina Katedro), okazinta en TORINO la 4-an de januaro.

Al la familianoj, la varmajn kondolencojn de I.E.F.

OFICIALA KOMUNIKAĴO DE LA AKADEMIO

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) « solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof », kaj de la unuanima Komitato de UEA « kiel eble plej baldaŭ » difini tiun solvon;

samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (UEF) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (EUGI) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatio, jura aŭ politika dokumento, nome:

1. « Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970 », do la garantiantoj estos kvitaj:
A) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon;
B) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.
2. « Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo »:
A) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;
B) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.
3. « Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon »:
A) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto;
B) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.
4. « Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio »:
A) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;
B) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

la Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj), decidis kaj deklaras ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia ebleco de dusenceco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉisuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

G. Waringhien **Prezidanto**
P. Neergaard **Vicprezidantoj**
A. D. Atanasov

R. Bernard
D. B. Gregor

Sekretario
Direktoro de la
Gramatika Sekcio

ANONCETOJ

Mi serĉas poŝtmarkojn (novajn/uzitajn), kaj oficialajn poŝtstampojn pri esperantistaj temoj. Skribu por interkonsento precizigante postulitan kompenson, al: S-ro Antonio De Salvo - Via Montesilvano 15 - 00156 ROMA.

Ĉe S-ro Sergio Martina, estrarano de I.E.J. (Corso Einaudi 35 - 10129 TORINO), estas mendeblaj la demandiloj por enketoj ĉe la lernejoj medioj. La Grupoj, kiuj intencas aranĝi tiujn enketojn (vidu n-on 108 de nia

revuo), estas invitataj priatenti ĉi-tiun anonceton.

D-ro Stoppoloni pardonpetas, dankas kaj recipokas al la amikoj kiuj skribis, al kiuj li ĝis nun ne povis respondi, ĉar superŝargita per diversaj laboroj.

Samideanoj, junuloj, preparu vin pasigi viajn aprilajn libertempojn en Montecatini Terme (Italio) por partopreni la 4-an Eŭropan junularan renkontiĝon kaj la 39-an italan kongreson.

L'Eco della Stampa

UFFICIO di RITAGLI da GIORNALI E RIVISTE

Casella Postale 3549 - 20100 MILANO

Via G. Compagnoni, 28 - Telefono 72.33.33 - 20129 MILANO

FONDATA nel 1901

Direttori

UMBERTO FRUGIELE
IGNAZIO FRUGIELE

